
# LA JUNA PENSO

n-ro 110

ISSN 0237 5838



La Juna Penso, esperanto-gazeto
67 ave. Gambetta - F 75020 Paris

7 fois par an / 7 foje jare
Aprilo-Majo 1976. Prezo : 3,00 F.F.

## PERANTOJ

| | | | |
|---|---|---|---|
| Argentinio | 2.20 | dol. | Enio H. Garrote, Juan Pineyro sud 560, Cordob |
| Belgio | 160 | BF | Katja Lödör, Brusselsesteenweg 385, B-9219 Gentbrugge, pĉk 000-0591594-88. |
| Britio | 1.80 | p. | Christopher Long, Holly Spring Hostel, Jig's Lane, Bracknell, Berkshire. |
| Danio | 25 | kr. | Uwe Lhose, Christianshavns Volgade 51,2 1424 Kopenhago K. |
| Finlando | 15 | mk. | Provizore, rekte al la centro. |
| Francio | 18.50 | FF | La Juna Penso, 67 ave. Gambetta, F-75020 Paris, pĉk La Source 34 268 70, sama adr. |
| Germanio | 14 | mk. | A. Stephan, Carmenstrasse 5, Düsseldorf-Oberkassel D-4, pĉk 9168 Essen. |
| Hispanio | 130 | pes. | José Bernabeu, Gral. Primo Rivera 6, Callosa de Segura. |
| Italio | 2000 | l. | Giovanni Marchiori, Via Cantore 15 (Gall. Astra), I-37100 Verona, pĉk 28/22942. |
| Izraelio | 9 | l. | Ch. Hocchauser Armony, P.O. Box 5171 Haifa. |
| Japanio | 750 | y. | Mine Yositaka, Kitahama Kitawaki, 29-16, Takasago hyôgo-ken 67101, pĉk Kobe 72148. |
| Jugoslavio | 16 | d. | Zijo Ajdinović, Jovana Cvijica 16/1, Sarajevo. |
| Kanado kaj Nordameriko | 5.00 | dol. | Brian McClafferty, PO Box 246, Station "F", Toronto, Ontario, Kanado. |
| Nederlando | 12.50 | gld. | Bert de Wit, Leidsevaart 52, Vogelenzang, NL-1557, pĉk 270 31 31. |
| Oceanio | 3.00 | dol. | Rita van Rijswick, 14/8 Tintern Rd, Ashfield, NSW 2131, Aŭtralio. |
| Portugalio | 80 | esk. | Paulo Branco, rua Filarmonica 23, Vestiaria, Alcobaça. |
| Svedio | 18.50 | kr. | Inga Johansson, Vedumsv. 12, 52400 Herrljunga. |
| Svisio | 13 | SF | Martine Schneller, 57 rue des Maraîchers, CH-1205 Genève, pĉk Gen. 12-19629. |
| Venezuelo kaj Sudameriko | 2.20 | dol. | Fl. Gabalda, IUT Apartado 40347, Caracas 104, Venezuelo |

La verkantoj mem respondecas pri la enhavo de la subskribitaj artikoloj.

Titoloj kaj subtitoloj estas aldonitaj de la redaktantaro, se ili ne klare jam estas men citaj de la aŭtoroj.

Post diversaj rimarkoj pri pseŭdonime subskribitaj artikoloj, ni anoncas, ke nia antaŭa frazeto "Pseŭdonime skribitaj artikoloj estas akceptitaj senrezerve" ne tute ekzakte spegulas nian realan sintenon : per la vorto "senrezerve", ni celas diri, ke ni pretas akcepti ĉies prozaĵojn, inkluzive tiujn, kiujn la aŭtoroj ne deziras aperigi sub propra nomo. Kondiĉe, ke ni konu la aŭtoron koncernitan, ni volonte akceptas la pseŭdonimon. Tiuj, kiuj kredigis, ke alian aferon ili komprenis, nun estu certaj, ni esperas, pri nia firmeco rilate al ĉiama principo de LJP-redaktado.

La adreso de SAT, 67 ave. Gambetta nur estas poŝta adreso ; oni do ne konsultu LJP-on kiel oficialan organon de la asocio.

Broŝurservo : LA JUNA PENSO, F-47340 Laroque-Timbaut.

Abonoj validaj de 1-a de januaro ĝis 31-a de decembro. Aerpoŝte : duobla tarifo. Dujaraj abonoj (nur por nepagipovaj landoj : duobla tarifo).

La manuskriptoj ne estas resenditaj de la redaktantaro.

PROVU NE SENDI BANKAJN ĈEKOJN, MALFACILE NEGOCEBLAJN !!!

## "KION VI POVOS KREDI, SE TION VI NE KREDAS ?" (1)

Post la numero 109, ĉu pro la kovrila desegno, ĉu pro niaj atakoj kontraŭ fi-papo, tio sendube restos mistero eterna, se ni apartigas kuraĝan anoniman leteron el Montpellier (francio), malabonon en Svisio kaj artikolon kiun vi legos en ĉi-numero, ni nur ricevis kuraĝigajn leterojn. Multaj abonantoj tre ŝatis la nov-tipan aspekton de LJP, kaj la nombro da legantoj daŭras kreski.
Malplezuro estas por ni la neebleco aperigi interesegan detranĉeblan broŝuron pri politikaj malliberuloj en Ĉilio : verŝajne kulpas la poŝto, kie multaj strikoj okazis en la pasinta monato. Sed ni tamen havas la plezuron prezenti al vi tre valoran kontribuaĵon de K-do Valo pri "La rasista naturo de Cionismo", tute novan desegnitan bendon adaptita de K-do Bert de Wit, du plenplenajn paĝojn pri poezio.
Dank'al K-do Jopetro Danvy, ni retrovas la longtempe forajn krucvort-enigmojn : vi ne hezitu sendi viajn problemojn !
Laŭ ni, la poeziaj paĝoj estas gravaj, ĉar tiun literaturan formon oni tro malofte vidas en nia medio; rilate al poezio, ni alvokas la legantojn al partoprenado : multaj esperantistoj verkas poemojn, sed ne kuraĝas publikigi ilin. Do, originalaĵojn kaj tradukojn ni atendas !

Do, kiel vi vidas, nenio nova en LJP : nur poezio, krucvortoj, kaj valoraj artikoloj ! Ni ĉiam estas elstaraj !

En la venonta numero aperos ankoraŭ pli elstaraj kontribuoj, kaj la jarraportoj ... Sed tion atendante, vi ĝuu la enhavon de via zageto.

<u>LJP-Prizorgantaro.</u>

Kunlaboris en la preparado de ĉi-numero :
Gek-doj Petro d'Yvoire, Armelle Le Puil, Jak Le Puil, Cendrina Le Puil, Jopetro Danvy, Renata Meurant, Gerardo kaj Joëlle Delepierre, Laŭrenco Septier.
La kovrilan desegnon oni ŝuldas al K-do Bruno Couette.

---

(1) el "Andromaka" de J. Racine, A. IV, sc. 3.

---


Oni ofte provas difini la politikan terenon de LA JUNA PENSO; inter la diversaj vortoj "aventurisma", "oportunisma", "epikurisma", ktp, malofte oni kapablas elekti. Tutsimple, ĉar LJP ne estas nurunutendenca ! Ni tamen al la listo povas nun aldoni vorton : "goŝisma". Kvankam ni ne estas (nur) goŝistoj, tiun vorton certaj uzos rilate nin. Do, kio estas "goŝisto" ?
En "Le Travailleur espérantiste" (La esperantista Laboristo), n-ro 8, febr. 76, eld. Fédération espérantiste du Travail, oni legas jenon : "Ni proponas do kiel neologismojn la vorton <u>GOŜISTO</u> kun la difino "ano de goŝismo" kaj la vorton <u>GOŜISMO</u> kun la difino "politika sinteno maldekstre oportunista kaj <u>ŝajne</u> radikala".
Tiujn neologismojn oni ĝis nun ofte tradukis en esperanto per "maldekstristo" kaj"maldekstrismo". Kaj kvankam ni ne tre ŝatas la ĉeeston de la vorto "oportunista", ni tre dankas al la francaj gekamaradoj kiuj proponas tiun solvon.
Tamen, oni ne reduktu la "tendencon" de LJP nur al goŝismo !
Aliajn solvojn, eventuale pli taŭgajn, ni volonte atendas por solvi tiun malfacile solveblan tradukproblemon.
Proponojn oni sendu al LA JUNA PENSO.

---

ATENTU ! SAT-JUNULFAKO RENKONTIĜOS EN GENT, TRE BALDAŬ ! NEPRE PLENIGU LA PROVIZORAN ALIĜILON ! TUJ KURU AL PAĜO 10 POR INFORMOJ !

---

LA SENDEPENDIĜO DE SURINAMO.




La 25-an de novembro 1975 en la mondo ekestis la nova respubliko "Surinamo". Post 308 jaroj kiel konkerita lando, kolonio kaj ŝtatparto de la Nederlanda Stato ĝi fine estas libera.
Sed kiel evoluos la libereco ? Kial unu triono de la popolo "fuĝis" al Nederlando antaŭ la sendependiĝo ?
Por kompreni tion, necesas scii ion pri la historio de Surinamo.
1640 : Koloniigo de Surinamo far Britio.
1667 : Paco de Breda (inter Nederlando kaj Britio). Britio "ricevas" Nov-Amsterdamon, la nuna Nov-Jorkon. Nederlando "ricevas" Surinamon.
Por daŭrigi la laboron en la sukerplantejoj ne sufiĉas la etnaj popoloj (indianoj). Tial en 1683 sklavoj estas importitaj el Okcident-Afriko.
Dum militaj atakoj de najbara lando (Franca Guyana) multaj sklavoj fuĝas al la praarbaro. Kaj de tie komenciĝas gerilaj atakoj sur la plantejoj.
1793 : Sklaveco en Franca Guyana estas malpermesita.
1804-1816 : Surinamo denove en britaj manoj.
1808 : Importo de sklavoj estas malpermesita.
1833 : En Brita Guyana sklaveco estas malpermesita.
1863 : "Emancipiĝo". La 1-an de julio ĉiuj sklavoj estas liberaj sed devigataj labori ankoraŭ dek jarojn, kiel "liberaj" laboristoj.
1865 : Komenco de parlamenta sistemo.
Pro malpermeso de sklaveco en 1873, hindoj el Brita-Hindujo venas kiel kontrakt-laboristoj.(Malpermesita en 1917).
En 1890 venis la unuaj javanoj kiel kontrakt-laboristoj (Java estas insulo de nuna Indonezio).
De 1940 ĝis 1945 la ekonomia situacio estas bonega pro vendoj de baŭksito uzita por usonaj aeroplanoj.
1948 : La unua kunveno, por ŝanĝi la kolonian sistemon.
1954 : Statuto por la "Reĝolando de la Nederlandoj". Surinamo, la Antiloj (insuloj Aruba, Bonaire, Curaçao, Saba, St.Maarten kaj St.Eustatius) kaj Nederlando egalrajtaj konsistigas la "Reĝolando"-n.
1973 : Koalicio de precipe kreolaj partioj ekhavis 22 lokoj en la 39-loka parlamento.

La nova ĉefministro ne longe poste deklaris, ke la registaro deziras la sendependiĝon de Surinamo.
Ekestis multaj protestoj de la hinda opoziocio.
La popolo ekzistis el : 37 % hindoj, 31 % kreoloj, 15 % javanoj, 10 % arbaraj negroj (ili fuĝis el la plantejoj), 2,6 % indianoj, 1,5 % ĉinoj, 2,9 % diversaj. Estas artefarita popolo kun diversaj religioj (hinda, islama, kristana), lingvoj, moroj.
Precipe la hindoj kaj javanoj ofte vivas laŭ malnovaj tradicioj kaj moroj. Inter si, ili parolas la propran lingvon. La oficiala lingvo estas la nederlanda. Sed neoficiale la "Sranang-Tongo" (negra-angla) estas ofte uzata.
Hindoj kaj Javanoj ankoraŭ nun laboras precipe en la agrikulturo kontraŭe al la kreoloj, kiuj ofte laboras en minoj, industrio kaj konstruado. La kreoloj ankaŭ posedas multajn gvidpostenojn en la lando.
Kiel en ĉiuj subevoluintaj landoj, mankas laboro. 10-35 % de la popolo ne havas laboron aŭ ne sufiĉe da. La ekonomia situacio ne estas tre rozkolora.
Surinamo ne povas prizorgi la nutradon mem kaj devas multe (50 %) importi. Sed 90 % de la eksporto estas en eksterlandaj manoj do ankaŭ la profito. Eĉ ne multaj homoj trovas laboron en la industrio : nur 6,5 %.
La ĉefaj rimedoj por ekzistado :
1) agrikulturo, 2) arbarkulturo, 3) minkulturo (en eksterlandaj manoj), 4) bestkulturo kaj fiŝkaptado, 5) komerco kaj industrio.
80 % de la landaj enspezoj venas el la minkulturo.Konklude la enspezoj estas malaltaj ĉar la minkulturo estas en eksterlandaj manoj, kaj donas nur 6,5 % da laborlokoj; sed tamen la lando dependas de ĝi.
Agrikulturaj kooperacioj bedaŭrinde ĝis nun malsukcesis.
Surinamo estas riĉa lando inter la malriĉaj, sed malriĉa inter la riĉaj.
Ĝis nun Surinamo apenaŭ havas kontaktojn eksterlandajn. Sed nun ĝi devos trovi lokon en la Karaibo.
Kvankam kulturaj, ekonomiaj, lingvaj kaj familiaj ligoj kun Nederlando restas.
Komence de la artikolo mi diris, ke unu triono de la popolo (130 000 - 140 000 homoj) "fuĝis"al Nederlando.
Kial ? - Ĉar post la sendependiĝo en Brita Guyana, la kreola malplimulto brute subpremis la hindan malplimulton.
- Ĉar la ekonomia situacio estas malbona.
- Ĉar multaj homoj ne povas trovi laboron.
- Ĉar la opozicio ne konsentis pri la sendependiĝo.
- Ĉar Nederlando estas la ora lando, kie senhavuloj ricevas domon, meblaron, vestojn kaj monon por vivi.

Tial unu triono de la popolo fuĝis al Nederlando.
Kvankam la konstitucio estas juvelo el jura vidpunkto, granda amaso timis la estontecon.

Lus (31 660)


---

NDLR : Ĉar Lus tradukis la nomon de franca kaj brita Gvajanioj per resp. franca guyana kaj brita guyana, ni ne volis ŝanĝi tiun formon; laŭ P.I.V., la nomo estas, por la regiono : Gvajano, kaj por la du cititaj landoj, Gvajanio.

---

Ĉu vi konas la mirindan, elstaran, preskaŭ tiel valoran kiel LJP, eĉ pli, diraj iuj, revuon
LA TORNISTRO
kies numeroj 1, 2, kaj (eĉ) 3 jam aperis !
Tuj, nepre, evidente, memkompreneble, vi ŝtopu tiun truon en via kulturo !
Tiuj numeroj estas haveblaj (kaj ne malhaveblaj) ĉe :
Prof. ADAN HRYNKIEWICZ, C.C.58 SUC. 12, 1412 Buenos Aires, Argentinio, kontraŭ 8 int. rpk. por ĉiu ekz. aŭ (nur !) 20 por la trio.
Jarabono 76 akceptitaj : aperas du 24-paĝaj kajeroj dum la jaro, kaj tio kostas nur (ridinde !) 8 int. rpk.

---



<u>Horizontale</u> :
I. Alĝustigo-En katedralo. II Sen ĝi, vi ne estus ludanta nun-Grekejo. III Ne preciza-Senĉese, ire kaj revene. IV Reordigo cifera. V Bonorde-En Kolonjo. VI Primitiva konduto-ne vira. VII Sciigo. VIII Angulo (R)-Indikas la proksimecon-Nek ŝi, nek ĝi. IX Montaraj arboj-Portugala mono (R). X Kverko (R)-Mallongigas la vivon postmortan.

<u>Vertikale</u> :
1. Ĝustatempa-Malfacile farebla en lito (R). 2. Camboreto-Plinombrigas. 3 Kunigas-Laùleĝa. 4 Nur famuloj tion havas. 5 Normala inklino por pacistoj-Insiste. 6 Necese-Muzikilo (R). 7 Muzikero-Sen ĝi, vi ne estus ludanta nun (R). 8 Lando. 9 Religiuloj pretendas ĝin posedi-Sendube, la plej bona. 10 Muzikaĵo-Memkontentiĝo (R).

La ĝustan solvon de tiu krucvortenigmo ni premias per <u>unu-jara abono</u> al LJP, profite al persono nomita de la gajnintoj.
Pro la longa tempo necesa por atingi orientajn landojn (LJP foje alvenas en Japanio kiam ni presigas la sekvantan !), tiun premion gajnos la <u>du</u> unuaj ĝustaj respondintoj el ĉiu kontinento. Do, cerbumu ! La solvon <u>ni</u> publikigos kiam la premioj estos atribuitaj, kompreneble !

===================================================================

.LINGVA KVADRATO :

Mi ege ĝojas, ke via elstara zageto partoprenu la grandan kampanjon por plibonigi la lingvan nivelon de la esperantistoj.
Permesu ke mi mem ankaù partoprenu.
Iu eraro kiu hirtas mian lingvologikecon estas la duobla neado.
Komence, ekzistas la eraro kiun faras kelkaj lingvanoj, interaliaj franc-lingvanoj, tradukante esperanten frazojn vort-post-vorte.
Ekz. : "Mi ne vidas neniun", "Mi ne sentas nenion", "Oni ne havas neniam la tempon" ...
Tio estas eraro, memkompreneble.
Tamen, mi rimarkas ke multaj lingvokapablulo j uzas stilefekte similajn frazokonstruojn.
Ekz. : "Tiuj rimarkoj ne estas malpravaj", "La artikoloj de Raoul van Troeyen ne estas malveraj", "Tio ne estas senutila" ...
Tamen, tio estas regula, kvankam estus malfacile klarigi al komencantoj kial ili eraras, kaj kial ĉi-lastaj frazoj estas regulaj.
Mi donu lastan ekzemplon, kiu entute pravigos mian teorion. Post la apero en LJP 106 de mia artikolo "La cikado", profesoro Varohigieno (kies varoj ne estas puraj), balaisto de la esperantista malamikadejo skribis al mi leteron, el kiu mi tiras jenan ekstrakton :
li diras al mi, pri humuro : "Ne neglektu, malgraù via malico, ke nepre necesas ke ĝi estu nek neùtrala nek negativa".
Ĉiuj legantoj ja rimarkis la eraron, kaj certe ĝin korektis. En perfekta esperanta lingvo, necesas diri : "Glektu, graù via ico, ke pre cesas ke ĝi estu kaj ùtrala kaj gativa".
Tiu artikolo ne nur ne estas anonima, sed krome, ĝiestas subskribita

D.O. SILONO

(denove, tiu kvadrato ne estas kvadrata; ni petas indulgon de la legantoj).

===================================================================

Esperantista renkontiĝo 19a k 20a de junio 1976 en Novasent. Vojaĝemaj gekamaradoj bonvenaj. Proks. 600 km sude de Parizo. Programo interesa amuza kaj lerniga. Muzikado, kantado, ludoj kaj observado de la steloj. Diskonigu la semajnfinon en Novasent en la tuta mondo !
Informoj : Dakapo, Novasent, Gaydelle Bas, St Pastour, 47290 CANCON.

===================================================================

---

# LA RASISTA NATURO DE CIONISMO.

---

La teksto, kiun ni ĉi tie publikigas, estas redaktita de Prof. Izrael Ŝanak, judo naskita en Varsovio 1933, deportita kiel infano en Bergen-Belsen, nuna prezidanto de la Izraelia Ligo por la Homaj Rajtoj.

" Jen estas mia nature pripensita konvinko : la Izraelia Ŝtato estas rasista ŝtato en la plena senco de la vorto. Pro la nura fakto de ilia deveno, tieaj enloĝantoj estas viktimoj de daŭraj leĝaj diskriminacioj en la plej gravaj partoj de la vivo. Ţiu rasa diskriminacio fontas el cionismo kaj estas nuntempe aplikata tra la instituciój de la cionista movado.

Mi dezirus apogi tiun aserton per citado de faktoj, leĝoj kaj reglamentoj, kiuj estas nun observataj en Izraelio (ĉe vido kaj scio de ĉiu) kaj aplikataj de la registaro mem. Mi pritraktos ĉi tie nek la rasismon de individuoj nek la duonoficialajn pravigojn al ĝi.

En la Izraelia Ŝtato, kiu ne estas judo, kaj pro tiu nura motivo, tiu estas objekto de diskriminacio en la sekvantaj kampoj :

<u>La rajto restadi aŭ fondi entreprenon en loko de li elektita</u>.

La pli granda parto de la tero en Izraelio apartenas al la Nacia Juda Fonduso (N.J.F.) aŭ estas de ĝi administrata. Nu, la N.J.F. estas branĉo de la Cionista Organizo kaj praktikadas rasistan politikon perfekte akceptatan. Al ne-judoj estas malpermesite restadi aŭ fondi entreprenon aŭ komercan firmon sur tiu tuta parto de la teritorio, eĉ, iafoje, tie labori. Tiu politiko ne nur estas rigardata kiel leĝa - dum en la pli-multaj landoj la diskriminacioj kontraŭ judoj estas malleĝaj - sed ĝi estas apogata de la tuta aparato de la izraelia potenco.

Tiel oni povis krei en Izraelio urbojn tute "purigitajn el araboj" - oni devus diri "purigitajn el ne-judoj". En aliaj urboj, kiel Alta-Nazareto, specialaj kvartaloj estas rezervitaj al araboj. Ĉiu provo de arabo por aĉeti aŭ lui loĝejon de judo tuj renkontas kontraŭstaron de la oficialaj instancoj (Ministerio de Loĝado, magistrato, kc), kiel ankaŭ, dirende, tiun de judaj loĝantoj mem, evidente helpataj de la izraelia polico. Kontraŭe, neniu problemo, se la eventuala aĉetanto aŭ luanto povas pruvi, ke li estas judo, t.e. ke lia patrino, avino aŭ praavino estas aŭ estis judino.

Ni havas ekzemplon per la kazo de Sro Muhamad Ma'aruf, izraelia civitano el la vilaĝo Dir..Al-Asad, kiu deziris instali uzinon en Karmiel. Al li estis oficiale rifuzite. La motivo ? Karmiel troviĝas ekster la limoj de la sektoro rezervita al ne-judoj ; kaj Sro Ma'aruf devis fondi sian uzinon ekster la "judaj limoj" de la urbo.

Mi insistas pri la fakto, ke tiu speco de limiga kondiĉo, kiu konsistigas gravan rasan diskriminacion, estas aplikata sur la pli granda parto de la izraelia teritorio.

Tion koncerne mi dezirus fari kelkajn rimarkojn :

- Estas neniu rilato inter tiuj disponoj kaj tio, kion oni nomas ĉi tie la "necesoj pri sekureco". La menciitaj limigoj koncernas ĉiujn ne-judojn, inkluzive tiujn, kiuj servis en la izraelia armeo, tie distingiĝis, estis vunditaj aŭ - se ili estas mem tro maljunaj - kies filoj estis soldatoj en tiu armeo.

Sro Ma'aruf, antaŭe citita, estas druzo, kaj tial ĉiuj viroj el lia familio faris devigan soldatservon, samkiel la judoj. Tamen li ne havas la rajton, agnoskitan al ĉiuj judoj, loĝi en Karmiel. Ŝtelisto aŭ murdisto, plenuminte sian puntempon, rajtas tie loĝi, kondiĉe nur, ke li estu judo - sed "gentano", ĉu druzo, ĉirkeso, bedueno aŭ kristano, - eĉ se milit-invalido - ne rajtas, tial ke lia patrino ne estas el la "konvena raso".

- Tiu diskriminacio de rasista naturo havas ankaŭ nenion komunan kun la nocioj pri "dekstro" aŭ "maldekstro" interne de la cionista movado. La du plej rasistaj blokoj en Izraelio estas la "Cionistaj Socialistoj" kaj la membroj de la Nacia Religia Partio. Ilia ŝajne paradoksa kunligo estas bazita sur ilia komuna subteno al rasismo... Unu ekzemplo : kiam estis organizita (de la dekstro) manifestacio favore al la juda kolonio de Sebastia, la aktivistoj el MOKED (1) improvizis alian, antaŭ farmo apartenanta al generalo Arik Ŝaron, por protesti kontraŭ la fakton, ke li dungis arabajn laboristojn.

- La plej aĉaj rasistoj en Izraelio estas tiurilate la membroj de kibucoj, kaj inter ili tiuj de kibucoj "Haŝomer Hacair" (2), kiuj,

plie, estas hipokritaj. Ne-juda civitano havas neniun ŝancon esti akceptita en kiun ajn kibucon, eĉ en la okazo, se la filino de unu membro de tiu komunumo dezirus edziniĝi kun ne-juda agrokultura laboristo.

– Tiaj diskriminacioj, se ili estus aplikataj en aliaj landoj kontraŭ judojn, levigus – prave – fortegajn denuncojn pri antisemitismo... sed kia diferenco estas inter la malpermeso al judo penetri en Seud-Arabion kaj tiu, kiu malpermesas al ne-judo instaliĝi en Karmiel ?... En realo, la antisemitoj, kiuj strebas, ofte sensukcese, agadi en aliaj landoj, kaj la cionistoj ĉi tie en Izraelio, staras ĉe la sama flanko de la barikado !

Mi volus rapide elvoki kelkajn aliajn formojn de tiu diskriminacio :

La "reaĉeto" de la tero –

Kion signifas tiu nocio, kiu estas enradikigita en la cerbo de la izraeliaj infanoj ekde la plej elementa lernejo ? Se kredi la difinon donitan de la Ministro pri Edukado, savita (reaĉetita) tero estas tiu, kiu fariĝis juda proprietaĵo. Tiu, kiu ne estas tia, estas ankoraŭ en posedo de homoj, kies patrinoj ne estas judaj, kaj endas prizorgi ĝian "savadon" – Agentoj de N.J.F. – ricevantaj aktivan subtenon de la registaro kaj aparte de la sekur-fortoj – estas daŭre komisiitaj por la akirado de teroj, tiel en Izraelio, kiel en la okupataj teritorioj.

La plej bona kaj plej freŝdata ekzemplo estas tiu de la Rapiah-regiono. La homoj vivintaj en tiu regiono kaj perforte eligitaj, ĉu ili rajtos instali sin en la nova urbo Jamit (konstruita sur iliaj terbienoj)? La respondo, kategoria, de la oficialaj instancoj estas : "NE". Nur judoj rajtos loĝi en Jamit kaj en la kolonioj starigitaj en ties proksimeco.

Mi nepre volas substreki, ke tiu formo de racio, venanta de cionistoj, ne havas alian limon ol tiu de ilia ambicio "savi" la tutan teron de la "Juda Patrio" kaj elpeli ĉiujn ne judojn en ĝi troviĝantajn.

Rajto pri laboro –

Sub la titolo : "La izraeliaj aŭtoritatoj komisiitaj pri kolonioj entreprenas agadon kontraŭ la ludonadon de teroj al araboj" (MAARIV . 75 07 03), tiu gazeto raportas historion tipe rasistan. La Ministro pri Agrikulturo kaj la Juda Agentejo prizorganta la koloniojn ĵus lanĉis viglan kampanjon por elimini la "plagon", kiun prezentas la ludonadon de kampoj aŭ fruktarbaroj al beduenoj aŭ al arabaj farmistoj en okcidenta Galileo. La direktoro de la Juda Agentejo pri Galileo, Sro Aaron Nammani, deklaris, ke lia ofico sendis al ĉiuj responsuloj de tiuj kolektivoj cirkuleron ilin avertantan, ke la cedado al araboj de naciaj teroj por ilin kultivi aŭ rikolti, estas kontraŭa al la leĝo kaj al la reglamentaro koncernanta la judajn koloniojn. La aŭtoritatoj komisiitaj por la mastrumado de Galileo ordonas al la responsuloj sin deteni de tiuj faroj, kaj memorigas, ke jam lastjare juraj persekutoj estis entreprenitaj kontraŭ iuj el ili, kiuj ne observis tiujn ordonojn.

Mi, ĉar mi estas judo, rajtas lui fruktoĝardenon por rikolti kaj negoci la rikolton... sed arabo, ĉar li estas arabo, ne rajtas. Pro tiu delikto kolonioj estis punitaj ! Tamen, ĉar tiuj "kolonioj" estas en tiu lando tabuaj (tial ke ili estas esprimoj de la juda rasismo) oni konsentis privilegion al tiuj, kiuj malobeis la leĝon : anstataŭ venigi ilin antaŭ tribunalojn, oni kondamnis ilin reaĉeti sian "krimon" per "donaco" al mistera fonduso (la sumo de tiuj "donacoj" estas taksita je 750 000 izr. funtoj). En okazo de recidivo, "ĉia formo de registara subvencio estos de ili retirita. Ili ne havos plu akvo-asignon, kaj ricevos nek kreditojn nek pruntojn por la disvolviĝo de ilia komunumo".

La Ministro pri Agrikulturo, Sro A. Uzan, persone zorgas, ke tiu formo de rasa diskriminacio estu bone observata. Kaj tiuj disponoj destinitaj senigi arabojn – izraeliaj civitanoj – je ilia fundamenta rajto pri laboro kaj honesta vivteniĝado, estis antaŭitaj de jena deklaro de la Ministro de Agrikulturo : " ... La plimulteco de arabaj laboristoj en la juda agrikulturo estas kancero en nia organismo ! ".

Rajto pri egaleco antaŭ la leĝo –

La Izraelia Ministerio pri loĝado estas dividita je du sektoroj. La pli grava prizorgas – kiel ni jam vidis ĉe la demando pri Rafiah – iniciati kaj kondukadi rasistan politikon profite al judoj. La dua estas komisiita por la "loĝigado de minoritatoj", t.e. de ne judoj.

En Jerusalemo, ekzemple, dum la ministerio konstruigas interne de la urbo apartamentojn ekskluzive rezervitaj al judoj, la "departemento pri loĝigo de la minoritatoj" strebadas "dissemi la muzulmanojn kaj transporti ilin eksteren de la urbo. Same la "loĝatigado de Galileo" kaj la "judigado de Galileo" estas unu sola kaj sama afero ; neniam arabo estos akceptita por partopreni en tiu programo.

Sama politiko en la kampo de sanitaro. Kiam estis rigardate kiel oportune konsenti distingigan rangon al membro de MAPAM Abdul Aziz Zu'abi, oni nomis lin "Viceministro de Sanitaro por minoritatoj". Ankaŭ tie la cionista rasismo kreas du sektorojn apartigitajn. Tiel Sro Husejn

Kasem Mustafo, bedueno el Galileo - servinta en la armeo - antaù nelonge plendis, ke lia tribo ne ricevis rajton al vakcinadoj organizitaj de la Sanitara Ministerio. La rasa diskriminacio, kiu kuŝas en la koro de la sanitara politiko, favoras la elvolviĝadon de tia situacio.

- Mi ne deziras diskuti pri la pravigoj donitaj al <u>tiu rasista politiko</u>. Al mi ŝajnas grave, ke ĝi ja ekzistas. Tial la unua farenda afero estas agnoski tiun fakton : <u>la Izraelia Ŝtato estas rasista Ŝtato, fasonita de la rasismo de la cionista movado</u>. Poste oni povos debati, se oni deziras, pri la demando, kial rasismo, kondamnata kiam ĝi estas aplikata kontraù judojn, fariĝas bona kaj necesa afero, kiam ĝin aplikas judoj.

- Mi perfekte scias, ke la Izraelia Ŝtato ne estas la sola rasista Ŝtato. Por ekzemplo, mi pensas, ke la paragrafo 6a de la palestinana konvencio de 1968 prezentas rasistan aspekton. Tion mi ofte diris al arabaj kaj palestinaj aùskultantaroj, kaj ĉiam mi renkontis pri tiu punkto grandan komprenemon de ilia flanko. Sed la unua devo de ĉiuj izraelianoj kaj de ĉiuj judoj el la diasporo, kiuj sin difinas kiel subtenantoj de Izraelio, estas lukti kontraù la rasismon kaj ĉiujn formojn de rasa diskriminacio enkondukitajn de la cionismo en la Izraelian Ŝtaton, kaj direktitajn kontraù ĉiujn ne-judojn en ĝi vivantajn.

Tia luktado, kiu necese komenciĝas per analizo de la rasista karaktero de cionismo kaj de la Izraelia Ŝtato, kaj per kondamno al tiu rasismo, neniel povus esti kontraùjuda aù antisemita, samkiel la kondamno al la rasismo de la cara Rusio ne sekvigis malamon al Rusoj.

Sole, Ŝtato elimininta en sia sino ĉiujn formojn de rasismo, komencante per tiu de la registara politiko - povos iniciati kaj konduki politikon kapablan gvidi nin al paco, kiun la nunaj rasaj diskriminacioj igas neebla.

Prof. Israel Ŝanak
el "Cité Nouvelle" tradukis Valo.

(1) La partio "Socialista-cionista" sin prezentas kiel la maldekstro de la registara koalicio de "Alignment"

(2) Kibucoj apartenantaj al la MAPAM-partio kaj brue proklamantaj sian "socialismon".

<u>Noto de la tradukinto :</u>

Komento estus superflua. Mi nur dezirus akcenti, ke la aùtoro, pola judo, deportito kaj nun izraelia civitano, scias el propra sperto, pri kio li parolas. Certe li mem kaj unua konscias, ke la diskriminacioj de li denuncataj estas malpli drastaj kaj kruelaj ol la pogromoj en cara Rusio kaj Polio, la ekstermkoncentrejoj en nazia Germanio kaj la terorismaj agoj de palestin-muzulmanaj fanatikuloj. Restas la fakto, ke ili signas leĝan rasismon.

La francan tekston mi tenas je dispono de Kdoj Ben Alter, Armony, kaj de ĉiuj interesatoj.



NE FORGESU !

Dum Pentekosto okazos SAT-junulara renkontiĝo en Gent. Jam en antaŭa n-ro de LJP ni avertis ke la organizantoj nur efektive povos ekkomenci labori kaj kompili la programon, se interesitoj kaj kontribuantoj sinanoncas. El Nederlando jam kelkaj entuziasmaj SAT-junulfakanoj proponis aktive partopreni en la programo. Sed tio ne sufiĉas ! Ni volas internacian etoson.
Kursgvidantoj ! Propagandu ĉe viaj kursanoj. Venu grupe !
Izolitaj gekamaradoj venu ! Dum tri tagoj vi havos la okazon praktiki la lingvon, interŝanĝi ideojn, partopreni kulturriĉan, amuzoplenan kaj interesan programon.
Ni jam certigas pri : rolludo, esploradekskurso tra la urbo, debatoj, dancvespero, folkloristaj ludoj, kantoj, kvizo kaj promenado ekster la urbo.
Rilate prelegojn aŭ debatojn pri seriozaj temoj aŭ aktualj problemoj ni atendas sugestojn aŭ proponojn viaflanke !
Rilate al praktikaj informoj, ĝis nun nenio ŝnĝiĝis :

Tranoktado en junulargastejo,
Tranoktado + matenmanĝo por anoj de junulargastejo .................. 100 BF
" + " por ne-anoj " ................ 120 BF
Po varma vespermanĝo ............................................ 70 BF
La junulargastejo povas prepari kaj kundoni lunĉan pakedon por tagmanĝo je 35 BF.
Komuna varma tagmanĝo kostos ĉirkaŭ 100 BF.
La interesiĝo ĝis nun ne sufiĉas ! Je la fino de aprilo ni devas mendi provizoran nombron da litoj en la junulargastejo. Tiu, kiu havas la intencon veni, nepre anoncu sin antaŭ la 25-an de aprilo.
Sendu ĉi-suban formularon al la jena adreso : Katja LÖDÖR
Brusselsesteenweg 385
B-9219 GENTBRUGGE
Belgio.

PROVIZORA ALIĜO .... INTERESIĜO

Familia nomo :
Antaŭnomo :
Sekso :
Naskiĝdato :
Adreso :

Kiamaniere vi intencas vojaĝi :
Mi interesiĝas pri :

Mi povas kontribui al la programo per :

Mi petas informojn rilate :

"Mi estas 16-jara ĉino, gimnaziano, kaj deziras korespondi kun amikoj el la tuta mondo"; skribi al S.H. KWOK, Mendoza 983, 4400 Salta, Argentinio.

Deziras korespondi kun amikoj el la tuta mondo, speciale el [illegible]ster-eŭropaj landoj, kaj pri historio : BERND KNÖFLER, 402 Halle/Saale Kleine Ulrichstrasse 25, [illegible]R.

Korespondi deziras : K-do JAMASAKI MOTOHIRO, Sinsyu-daigaku Syukusya 4-403 Wakasato-minamiiti 1709-5, Nagano-si (380), Japanio : oni skribu, [illegible] per tajpilo, se ne eblas, nepre presliterë.

KOMISIONO POR EKSTERAJ RILATOJ DE TEJO, Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando, ĵus sendis al ni interesajn raportojn pri sia agado en 1975. Dokumentoj pri studseminarioj en 1976, pri labortendaroj, pri la celoj kaj agado de KER, listo de eldonaĵoj, estas haveblaj je la citita adr.

INTERVJUO DE KAMARADO RAOUL VAN TROEYEN.

LJP : Ni finfine vin renkontas, kaj tio por ni estas granda rivelo : ni jam delonge metis sur vian nomon konatajn vizaĝojn, sed ...
RVT : Sed vi verŝajne ne povis supozi, ke mi estas tiel malbela, ĉu ?
LJP : Hm, hm.Tio ne estas la temo de via ĉeesto en nia teamo. Efektive, ni iom primokis vin per desegnaĵoj en LA JUNA PENSO, sed ni ĉiam tre serioze pritraktis viajn verkojn, ĉar ili ŝajnas al ni tre konstruaj por la esperantista laboristaro. Ĉu hodiaŭ vi venas inter ni por trakti SAT-aferojn ?
RVT : Jes ja. Mian ĉeeston kaŭzis du deziroj : unue, mi volis viziti la laborejon kie oni redaktas, tajpas, multobligas vian karan "zageton", due mi volis rekte interparoli kun vi pri la rezultatoj de la ĵus finiĝinta referendumo por PK.
LJP : Ni efektive atendis reagon de vi tiurilate; ni mem estis aparte ŝokitaj pro la rezultatoj.
RVT : Kompreneble, maljunulo kiel mi jam delonge alkutimiĝis al tiaj aferoj en SAT-medio. Ekzemple, jam en 1959, la jenaj ciferoj aperis kiel balot-rezultatoj : el pli ol 3000 membroj, voĉdonis 384 (!), el kiuj 333 por la proponita listo, 13 (!) kontraŭ, 7 sindetenoj kaj 31 nuloj. Jam la entuziasmo de la Lanti-a periodo "en la nubo sorbiĝis for" ! Sed tiam, mi tion klarigis per mia unua artikolo en LJP ("SAT en revolucia procezo"), oni timis forperdiĝon de la tuta asocio : de la fino de l'mondmilito ĝis almenaŭ 1960, SAT nur malfacile rekaptis siajn perdiĝintajn fortojn. Tiam, tiaj ciferoj, kvankam gravegaj tial ke ili rivelis krizon en la memstareco kaj partoprenemo de la membroj, tiaj ciferoj estus povintaj aperi kiel nur konjekturaj.
Bedaŭrinde, aperas hodiaŭ, ke ne. Ve, la sama afero rekomenciĝas de pli ol 20 jaroj, kaj mi min serioze demandas pri la estonteco de asocio kies membraro tute ne partoprenas vivon.
LJP : Estus bone prezenti la ĉi-jarajn ciferojn al niaj legantoj, por ke ili povu mem miri kaj kompreni nian, kaj vian, reagon.
RVT : Tute prave ! Do, en 1975-76, nur 294 membroj voĉdonis. Oni jam povus sin peti, ĉu vere nur iom pli ol 10 % de la membroj kapablas resendi voĉdonilon; sed ŝajnas, ke prefere oni sin petu nenion, kaj vigle admonu al reala partopreno.
LJP : Jes. Jam tio estas tre grava afero. Sed kion vi opinias pri la ciferoj mem ?
RVT : Ha ! Fakte, ne nur la membroj apenaŭ partoprenas, sed ili ŝafe kaj blinde voĉdonas por kvazaŭ-eterne sama listo ! Ni ne parolu pri la ege juna kroma kandidato, kompreneble elektita ! Tamen, ni ekzamenu la ciferojn mem : el 294 voĉdonintoj, 281 jes, nur 9 (!) ne, 3 sindet. kaj 1 nul. aperas ! La pk do estis elektita laŭ procentaĵo, kiun oni ĝis nun nur vidis en neimitindaj historiaj ekzemploj, i.a. ...
LJP : Tamen, la komparo ne estas tute taŭga, ĝi estas troa !
RVT : Kompreneble, nur temas pri bildo. Sed mi petas min, ĉu iam la PK-on oni elektos per 150 aŭ 200 % de la voĉoj !!
Aŭskultu : delonge mi analizas la situacion nunan de SAT, kaj ĝi ne estas aparte bona. Se ni esceptas PIV-on, gravega eldono, SAT eldonis nenion depost 1970, krom kelkajn neglektindaĵojn. Ekzemple "Interesa Arkeologio" ne havas sian lokon, ĉefe nun, en kolekto de laboristaj libroj !. La kongresoj haladzas turismemon kaj rutinemon, la membraro ne partoprenas vivon de l'asocio, SAT pli kaj pli "fermiĝas" al "ekstera" mondo.
Jam marksistan analizon mi faris, en la supre citita artikolo, kaj kvankam nekompleta, ĝi resume respegulas la krizan staton de SAT en 1976, sen kalkuli la financan "serpenton". Mi kredas ke nun, tempo por tre konkretaj aktivoj venis; LJP-prizorgantaro jam multe aktivas kaj junuloj vigle praktikas niajn ideojn, i.a. SAT-ideojn. Sed tio ne sufiĉas.

---

NDLR : Pro manko da loko, ĉar mult nombraj kaj diversfontaj estas la kontribuoj en ĉi-numero, ni aperigos la sekvon de tiu intervjuo en la venonta numero.

## JUNULFAKO KONFISKITA ?

Kvankam tempo mankas al ni, ni decidis reagi pro la terura malpleno kaj sengusto de la lasta LJP. LJP, kiu pli kaj pli malboniĝas de numero al numero.
Kiel faka gazeto, post numero pri sekso, ĉiam kun"epikura" sento, kial ne aperigi kuirreceptaron ? Tio eble almenaŭ instruus nin !!
Tamen LJP havas alian rolon !
LJP devus speguli la spiriton de la junuloj de SAT. Sed ni ne rekonas nin en ĝi. Dezirinde estas, ke LJP havu komentojn pri aktualaĵoj. Aktualaĵoj, kiuj koncernas la celojn de SAT, kompreneble. Necesas respekti ekvilibron. Ekzemple, oni ne dediĉu al diroj de papo aŭ alia fantaziulo pli grandan spacon, ol la temo meritas.
Laŭ la regularo de la SAT-Junulfako, adoptita en Kuopio :
"(1) Ni estas junulfako de SAT kaj adoptas la regulojn de tiu movado.
"(2) Nia ĉefa celo estas disvastigi la sennaciecajn konceptojn de SAT en junularaj medioj, kaj organizi la junularan aktivecon en la kadro de SAT.
"(3) Povas esti ano de junulfako ĉiu SAT-ano ne pli aĝa ol 35 jara".
LJP estas komuna bulteno, kies respektivaj partoj apartenas al la junulfako de SAT, kaj al la frakcioj. Neniu loko restas por propagando kontraŭ SAT.
Ni rimarkis ke ĝis la numero 105 inkluzive regis la principo "La verkantoj respondecas mem pri la enhavo de la subskribitaj artikoloj." En la n-ro 106 aperas ŝanĝo. Al tiu teksto estas aldonita la frazo : "Sentitolaj artikoloj ricevas titolon de la redakcio kaj la subtitoloj venas el la sama fonto". En tio principe estas nenio kritikinda. En la n-ro 107 aperas du gravaj novaĵoj :
(1) "Pseŭdonime sribitaj artikoloj estas akceptitaj senrezerve." Tiu frazo nuligas ne nur la signifon de la unua principo "la verkantoj respondecas mem ..." sed ankaŭ la regularon de la junulfako. Laŭ la 1-a, 2-a kaj 3-a punkto de tiu regularo la junulfako adoptas la regulojn de SAT, celas disvastigi ĝiajn konceptojn, kaj ĝiaj membroj estas SAT-anoj. Nun, laŭ la nova aŭtokrata decido de la redakcio, ĉiu ajn, eĉ ne konata, malamiko de SAT, rajtas malpurigi niajn paĝojn.
(2) "La adreso de SAT, ..., nur estas poŝta adreso, oni do ne konsultu LJP kiel oficialan organon de la asocio." Ho hirtiga surprizo ! Cu tio signifas ke LJP "emancipiĝis" ? Se ĝi ne plu estas, almenaŭ en sia junulfaka parto, oficiala organo de la asocio, kies organo ĝi estas do nun ? Cu ĝi fariĝis tutsimple la posedaĵo de sia senrespondeca respondularo, Raoul van Troeyen kaj kompanio ? Sed tiuokaze, ĝi funkcias per mono trompŝtelita el la malriĉaj junuloj de SAT kiuj pensis aboni al sia bulteno, per la materialo de SAT kaj per ties adreso. Se la diversaj frakcianoj ŝatas la pli malpli spritajn entrudiĝojn de la redakcio en iliaj respektivaj paĝoj, tio estas ilia afero. La bulteno de la junulfako ne devus esti instrumento de la personaj plendmotivoj kaj ambicioj de la respondecularo.
La 13-a paragrafo de la statuto de SAT postulas de la kandidatoj al la PK minimuman maturecon. Gi malpermesis la kandidatiĝon de du kamaradoj por la nova PK. Nun ŝajnas, ke ili entreprenis pruvi per praktiko la utilecon de tiu paragrafo. Por tiu posteno ja pli gravas la SAT-eco ol la aĝo. Ni demandas nin, ĉu tiuj kamaradoj ankoraŭ ne eliris el infaneca nematureco aŭ jam disfalis en kadukajn maniojn. Ni zorge pesas niajn vortojn por indulgi la koncernatojn.
Estas vere, ke la materia prezento de LJP estas bonega. Sed tio ne sufiĉas. Certe ĝian nunan enhavon povas ĝui multaj malamikoj de SAT. Eble la nunaj prizorgantoj pensas, ke ili povas permesi al si ion ajn, ĉar neniu pretas anstataŭi. Sajnas, ke eĉ al ili ne urĝas prepari anstataŭantojn. Ili tamen ne troigu : eventuale estus pli bone interrompi denove dum kelka tempo la aperon de LJP, ol lasi ĝin plu fremdiĝi.

Anne-Sophie, Marie-Christine kaj Jean-Pierre LEVY

Ba ! [z] LJP-prizorgantaro.

LIBERO RESPEKTO TOLERO

Traleginte la tutan lastjaran kolekton de L.J.P., mi konstatis, ke tri temoj konsistigas la pli grandan parton el ĝia enhavo. Ili estas longe, larĝe, diagonale kaj zigzage debatitaj. Ili estas studitaj laŭ ĉiuj aspektoj – etika, estetika, ekonomia, socia, politika. Ciaj argumentoj estas interŝanĝitaj, sen escepto de humuraj paradoksoj kaj provokaj ŝercoj. Ĉio estas dirita, kaj bone dirita, la demandoj ŝajnas al mi elĉerpitaj. Ĉu tamen estos al mi permesite proponi personajn konkludojn ?

1- SEKSO -

Mi estas malsamseksema (eble mi pli modeste devus diri : estis – sed tio estas alia demando). Estas fakto, el kiu mi tiras neniun komplekson pri supereco. Male, mi iel bedaŭras, sincere konsciante, ke tio senigis min je pliriĉigaj spertoj, se kompari kun ambaŭseksemo. Mi neniel pretendas, ke mia emo estas pli bona, pli bela ol iu alia. Ĉu pli normala ? Kredeble jes, se tio signifas konforma al la plimulto – sed tiun difinon mi rifuzas. Ĉu pli natura ? Tia estas ja mia naturo, sed kio rajtigus min aserti, ke tia estas la homa naturo ? Mi diru : natura estas ĉio, kio ĝuigas la sekson : kopulacio, koito, masturbo en ĉiuj iliaj formoj. Mi nur rezervas, kiel esceptojn kaj verajn deviojn, sadismon kaj masoĥismon, kiuj, laŭ mi, koncernas patologion kaj psikiatrion.

Do anoj de ĉiuj aliaj seksumaj formoj estas nek kondamnindaj nek mokindaj. Ili plene rajtu preni sian plezuron, kie ajn ili ĝin trovas, eĉ propagandi sian propran guston, kondiĉe nur, ke ili ne strebu ĝin perforte trudi al aliaj.

2- TABAKO -

Mi ne tre amas cigaredojn, jam longe ne fumadis pipon, sed ne malpermesas al mi, de tempo al tempo, tre malofte, ĝui bonan cigaron. Mi scias pri la malbonaj efikoj kaj danĝeroj de tabakomanio, kaj mi aprobas la propagandon kontraŭ ĝin.

Sed al tabakamantoj mi konsentas la rajton difekti sian (ne alies) sanon, eĉ endanĝerigi sian (ne alies) vivon. Ili do libere fumu, sed nur en libera aero; aŭ hejme, se konsentas la kunvivantoj ; kaj eĉ hejme ili abstinu, se ili akceptas nefumantajn gastojn. La tabakano eĉ ne demandu, kun hipokrita ĝentileco : "Ĉu fumo ĝenas vin ?", ĉar nearespondo estus nur ĝentila mensogo.

3- VEGETARISMO -

Kvankam mi preferas, ĝenerale, freŝajn legomojn kaj fruktojn, mi manĝas ankaŭ viandojn (escepte de homa karno ; kanibalojn mi ne kondamnas, kondiĉe ke ili ne mortigu).

Mi trovas aprobinda la propagandon de vegetaranoj, se nur ĝi ne fariĝas tede truda. Samon mi dirus pri la poresperanta propagando : ni ja ĉiuj konas kelkajn el tiuj timegindaj fanatikuloj de la verda stelo. Tro estas tro, kaj la plej laŭdindaj aferoj estas fuŝataj de tiaj tedeguloj.

RESUME : Ĉiu estu libera, plene libera, sed ne forgesu, ke ĉies libero devas halti ĉe la limo, trans kiu ĝi atencus al alies libero.

LIBERECO POR ĈIU

RESPEKTO AL ĈIU

Entute : TOLEREMO. V A L O

================================================================

## ĈU ESTI OPTIMISTO ?

================================================================

Mi multe vojaĝis (tra Esperantio) k pli multe mi interkorespondadis kun la patriotaj antipatriotaj civitanoj de tiu stranga malekzistanta lando aŭ Universo ...

Iom post iom mi devis alveni al la konkludo, ke precize la kontraŭo okazas, ol devus okazi.

La Celo de la Internacia k eĉ sennacia Lingvo ja estas UNIVERSECO, KOSMOPOLITISMO, SENNACIISMO, AMIKECO, KAMARADECO, DECO ... RECIPROKA KOMPRENEMO, do, kiel ni jam diris, la ekzakta kontraŭo okazas en la tielnomata Esperanto-Movado : La junaj "esperantuloj" ne "ge" marŝas kun la ne-tiom junaj veteranoj, la "idiotoj" (laŭ la junaj) kiuj eĉ neas ilin kaj forblekas el la "movado" ; en la etburĝaj tute same, kiel en la rondoj de la "klasbatalantaj esperantistrondoj, ili ĉiuj, plejgrandparte, sin primokadas reciproke, bando da snoboj ; oni tre malofte povas trovi kelketajn - dissemitajn, ie ajn ... kiuj vere estas idealistoj de la Verda Afero, sed, ĉar mankas la solidareco inter ili, la snobismo enŝteliĝas ie ajn, k la nomita bando (da snoboj) metas finon al la bela ideo pri Esperanto, kiu estus devinta servi la interesojn de la klasbatalanta proletaro.

Dum la malbenitaj diktaturoj de la Stalinhitler kompanio, pereis centoj da "samideanoj" veraj anĝeloj, kamaradoj, amikoj ; ili pereis, ĉe tiu, ĉar ili hazarde naskiĝis judoj, do, estis samrasanoj de Zamenhof, k la ceteraj troviĝis sub alikolora premo, ie ajn en Siberio, kiujn la grava verkisto Solĵenicin priskribis en la famaj, sinceregaj verkoj, kiujn li persone devis travivi, ĉar la proletaro ne havas kuraĝon, defendi la Revolucion, la Liberecon de la homa individuo ; LA PARTIO transprenis la "aferon", laŭ la statuto de la partio, k tiamaniere la partio povas ekspedi ĉ i u n a j n proleton al mil gediabloj, tra neĝoj k vipoj k frapoj k malsato k konfesoj, pri aĵoj, neniam antaŭe revitajn, subite, tio estas, ne tiom vere subite sed post iom da karcero kun frostoj k kraĉoj k besteco superŝutataj sur la malfeliĉulon, tiu-ĉi ekkonfesas : Mi ? li diras, Mi estis faŝisto, mi meritas multoblan morton, mi vendis la Revolucion ; oni pendigis tiun proleton, kaj vagonojn da aliaj, al mil k unu ĥoleroj da epidemioj, se t i o povis okazi. K similaj aĵoj okazos, mi certe ne volas esti malblanka profeto, sed la edukado ĉie-ajn, speciale en la partioj, nin gvidas al la nova bastardeco, kaj tamen oni ne malesperu ; ke povas okazi, ke la ĵus-okazinta kom.partia kongreso HAVIS LA KURAĜON,(en Parizo, la 23a) ekstari kontraŭ la Breĵnjevismo (Stalinismo) kaj mi aŭdas la normalajn parolojn, ŝutita de la franca partiestro en la direkton de Rusio, ke se la diktaturo de la proletaro montriĝas TIA, kia ĝi fakte estas, malbeno kontraŭ la proletoj, do, tiam sufiĉas ... Kiom da milionoj da proletoj estis murditaj en tiu Rusio, kaj eĉ nome de la "Oktjabra Rrrrevolucio ?".

La idealoj estas primokitaj fare de la tiel nomitaj idealistoj same en Esperantio, kiel en la luktanta Proletaro.

Strange, ke dum miaj vagadoj tra la landoj, ĉefe dank al Esperanto, mi rimarkis, ke la esperantuloj jam delonge kutimiĝis primoki Esperanton, nome de Esperanto.

Kaj tamen, Esperanto ne nur estas lingvo, seka por kompreni la najbaron, ĜI DONAS AL ĈIU AJN LERNANTO LA KAPABLECON, salti en la aliajn "gelingvojn" ; Esperanto ESTAS SALTOBRETO en la diversajn frendlingvojn, tiom necesaj, tiom longe necesaj, kiom longe la esperantuloj ne konsideras tiun Zamenhofaĵon SERIOZA FAKTO, REALECO.

Malfeliĉe okazas la kontraŭo ; en la plej multaj Esperanto organoj aperas antisemitaj artikoloj, antijudaj, en tiu ĉi Esperanto Lingvo, kiun Zamenhof kreis kun la sankta Celo, kompreni unu la alian, en frateco.

ESTAS VERE MALFACILE ESTI OPTIMISTO, PRIPENSANTE, KIEL FAKTE ASPEKTAS LA MOVADOJ, aŭ pli ĝuste la VOMADOJ.

CH. HOCHHAUSER ARMONY

================================================================

MALFRUANTOJ ! NE FORGESU REPAGI VIAN ABONON !

================================================================

## NIA ENCIKLOPEDIO

Jen la sekvo de nia grandega verko : adapto en esperanto de "Petit Campion Illustré", vortareto verkita de franca kanzonisto, Léo Campion. Tiun "tradukon" (ofte tre malfacila), ni ŝuldas al la ruĝa suno de nia koro, K-do Ĵak Le Puil.

| | |
|---|---|
| Patrio | Loko, kie ni hazarde naskiĝis kaj kie, ofte, ni vivas pro neceso. |
| Pediko | Insekto, kiu marŝas sur la kapo. |
| Pelto | Haroj prenitaj de bestoj por anstataŭi tiujn, kiujn perdis homo. |
| Plaĉi | Oni plaĉas al virino, ĉar oni estas bela aŭ malbela, ĉar oni havas aŭ ne havas monon, ĉar ŝi havas amoranton aŭ ĉar ŝi deziras kokri tiun, kiun ŝi havas, ĉar oni estas pli juna ol ŝi aŭ pli maljuna, ĉar ŝi ne plaĉas al vi, ĉar ŝi trinkis ĉampanon, ĉiam, kiam oni alvenas je la ĝusta momento. |
| Plumo | Birdharo. |
| Poligamio | Teorio neakceptata kaj universale praktikata. |
| Politiko | Arto promesi, ne realigi kaj tamen sukcesi. |
| Popolamaso | La malkuraĝo de la nombro. |
| Prostituado | Ago lui, por vivi, siajn brakojn, sian cerbon aŭ sian sekson. Oni prostituas, tion, kion oni povas. Tial la protituino estas tiel honorinda, kiel la ĵurnalisto aŭ la mastrumistino. |
| Proverbo | Vulgara sentenco, entenata en malmultaj vortoj.<br>Ekzemplo :<br>- La plejbela ulino el la mondo, ne povas doni tion, kion ŝi ne plu havas.<br>- Helpu vin, la ĉielo vin ne helpos.<br>- La apetito venas ... ne manĝante. |

"R"

| | |
|---|---|
| Riĉeco | Unu troa monero. |
| Rido | Ili ridas, kiam siaj kontraŭmilitantoj mortas, tiel, kiel siaj kontraŭmilitantoj ne estus homoj. Se ili mem mortis, cetere, iliaj kontraŭmilitantoj ankaŭ ridus. Tio pruvas, ke ĉiuj ja tute pravas ridi. |
| Rideto | La plej pura formo de la I.L. |

## ARTIKOLO DIFINITA

K-do Laŭrenco Septier ja estas la ĉefredaktoro de LA JUNA PENSO ; tion oni scias, kaj ĉiuj prizorgantoj, respektoplene, nur tre diskrete rimarkigis al li la lastajn tajp-, gramatik-, kpt erarojn en LJP 109. Sed foje, neeltenebla estas la situacio. Tiu K-do havas gigantan personecon, kaj nepre, preskaŭ perforte, li volas trudi artikolojn al ni. Ke ni ĉion akceptu estas afero, ke ni akceptu ion ajn estas alia. Tamen, ĉar dank'al K-do Laŭrenco Septier LA JUNA PENSO iĝis elstara gazeto, kaj ĉar li agnoskis, ke tion oni ankaŭ ŝuldas al K-doj Le Puil kaj Danvy, ni akceptis lian lastan prozaĵon, kiu, efektive, resumas la tutan penson de nia ĉefredaktoro. De pluraj jaroj, li aspektis revema, iom en la nubo ; tion oni nur ŝuldas al la fakto, ke li streĉe provis kondensigi sian penson en plej konciza verko.
Nun, ni havas la honoron prezenti al vi tiun, cetere tre difinitan, artikolon de Laŭrenco Septier. Jen ĝi :

LA.

Laŭrenco Septier.

POEZIA ANTAŬANGULO

"Flaru tra la cementaj muroj
La raŭkajn tonojn del'motoroj
Ŝovu en pulmoj vakuitaj
la vidon del'trajnoj rulantaj
Kaj pensu tra stomako plena
Al morgaŭo kote eterna ..."

Estas ja strange ! La saman tagon, du eventoj malgravaj okazis. Ĉar publikigis mi en regiona esperanta folio etan senartan kvarversan ŝtopilon, oni nomis min poeto ! Estas ja la unua fojo, kvankam jam publikigis mi aliaĵon. Kaj samtage, mi ricevas poemaron por recenzo ! Atentu, rivalo !

Mi uzos ĉiun mian povon por nur postuli la aperon de tio kion mi ŝatas ! Ekzistas tiom da poezioj kiom da poetoj, se ne pli ! Kaj ĝis nun, la poezion en nia lingvo, mi ne tre aprezis. Kiom da emfazo ! Kiom da seninteresaĵoj ! La plejmulto de la poemoj kiujn mi legis, aŭ rampas en la nerkontentiĝa idealismo, aŭ flugas en sunaj nebuloj.

Feliĉe, skribis mi ; iam mi proponos iom alian, ternivele. Ĉu la ĉefa celo de poezio ne estas vidi la realon tra okuloj mirigitaj ? Kiom da aŭtobusoj, veturiloj, elektraĵoj svarmas en miaj verkoj ! Sed mi tro parolis pri mi. Ni legu iomete la verkon recenzotan.

"La duan fojon ĉi-vespere mi klinas min tra trajnfenestro : antaŭe por aeron spiri, nun noktaj papilioj flirtas kontraŭ la vitroj dum senvide ĉiuj atendas lumverdiĝon trankvilaj, kvazaŭ mano nola flugilhavigus maleolojn."

Jen interesaĵo, ĉu ne ? Se mi estus skribinta tion, mi sufiĉe kontentiĝus. Poemeto, impresetoj, io esprimita el la senesprimebla ĉiutaga melankolio, tion ankaŭ mi faris, sed mi tro parolis pri mi. Ni daŭrigu la legadon

"Neĝo klarigas la aeron,
kolektis la polverojn
kaj donis al ni sur la vitro.
Alie ni povus forgesi,
ke la mondo estas malpura-
tra eknalfermita fenestro
vidi pejzaĝon tute novan
kaj scivoli, ĉu ni eble
ne nian trajnon trafis ? "

Konsentite, mi ŝatas tiun poemon, kaj ne estas recenzisto fidinda. Mi ne rimarkos la aliteracion, la eliziojn, la neologismojn, la regulecon, kaj ĉiuj tiuj aferoj kiujn kutime la priskribanto devas emfazi. Se vi ne ŝatas, legu alion !

Estas ja strange ke en "nia" tielnomata laborista movado, oni ne tiom parolas pri la ĉiutaga vivo. Kiom da trajnoj ni uzis dum nia vivo, kaj nenie oni trovas la postrestojn de tiuj horoj kiuj plenigis nian feliĉeblecojn ! Kial ili ne aperas pli ofte en literaturo, kiam parto inter ni lasas dekonojn de siaj tagoj sur stacia kajo aŭ en trajna kupeo ?

"La vaterloa vagonaro
malfruas pro... "ĉe ni mi farus,
sed en alies necesejo,
se oni vin..." - "ĉu la tereno ?"-
"jen fajroj... ne, la flughaveno"-
"sed mi kontrolis : laŭ la mapo,
ĉi-flanke de la vojo..." -
"Jesu', patrino de Maria,
mi portas ciment-sakojn tiajn
la tutan tagon..." -
"nu, tiu ruĝ-puloverulo
eĉ tiam estis jam drinkinta :
jen kiaj fifamigas klubon..."
La vaterloa vagonaro
malfruas dudek-kelk minutojn."

JOPEDAN recenzis du kajeretojn

"Rimarkoj" kaj "Remarkoj" de Christopher Long (Verŝajne nur haveblaj ĉe la aŭtoro, sed eĉ tio ne certas). Li krome verkis mem la unuan strofon.

---

La 61-a Universala Kongreso de Esperanto
okazos en Ateno, Grekio, de 31a de julio ĝis 7a de aŭgusto 1976.
La ĉeftemo de la kongreso estos : "Internacia kunlaboro de ŝtatoj je regiona nivelo" ; interna ĉeftemo : "Kiel nuntempe argumenti por Esperanto ?".
Aliĝilon kaj informojn oni petu al :
UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO
Centra Oficejo
Nieuwe Binnenweg 176
NL-3002 ROTTERDAM
Nederlando.

## Vi.

brilokule
brustohule
brakolule
bridi nule
        kiom rave
        kiom prave
        kuŝi gee
vortoj ĉarmaj
ventroj varmaj
kune fiki
fendon fliki
        post volupta ventrorajdo
        venas la malflusa tajdo
        la paco
        de l'kaco
tute mutaj
marmalsekaj

Cor Bruins

## Silvestro (1974)

Tiom da sango
tiom da larmoj
mi vidis ĉi-jare
ke el mia koro
nenio restis
ol ĉambro malpura
kie muroj kovritaj
per nomoj jam palaj
retenis forkuri
min de l'homsuferoj
viditaj ĉi-jare.

## Senlaborulo

Nenio plu
lin povos ankoraŭ ĝojigi
tro lia sufer'
pri de l'entrepren' la likvid'
kie el sia viv'
plej belajn li jarojn pasigis

En kunvenej'
kri' de l'malesper' ne eĥiĝis
atingis venkit'
li l'hejmon kaj jam forgesit'

Pierre van Vollenhoven, nederlanda poeto-laboristo, trad. Marjo van Bentum.

## Je nomo de Dio

Bebo blinda, muta, surda
sen la brakoj, unukrura
    vivu bebo vivu
    la vivo estas sankta
ni gardos vin en institucio
objekton de kompato.
    je nomo de Dio

Bebo herede malsana
doloroj akraj turmentos vin
    vivu bebo vivu
    la vivo estas sankta
la malsanulejo via hejmo
senfinaj viaj suferoj.
    je nomo de Dio.

Bebo kun menso malsana
la korpo ja kreskos
sed la menso ne povos
    vivu bebo vivu
    la vivo estas sankta
bebo eterna en korpo plenkreska
dependa de bonvolo.
    je nomo de Dio.

    kaj vi patrino ?
vi sklavos tage, nokte
senĉese senfine
sensence senutile
    la bebo devas vivi
la vivo estas sankta
    sed la via ?
    je nomo de Dio.

La vivo estas sankta
soldato mortigu malamikon
ni benos la armilojn
ni preĝos por la venko
    la vivo estas sankta
    je nomo de Dio.

La vivo estas sankta
soldato mortu, mortu por patrujo
glore honore heroe
ni kantos kantikon
    la vivo estas sankta.
        ĉu ne klerikoj ?


R. de Jong-Beukers

## Troutbeck

Folioj falas sur la mapon
sur la ombritajn tendajn kampojn
- blua postskribo de inundoj,
rustaj makuloj de filiko -
la vojon supren akvo flikas
kaj tuŝas ekventet-hirundoj,
ĝis inter valoj nub-palpebro
la plej mallongan tagon fermas.

Kris Long


"Domo por ĉiu"
Nia nova bildrakonto.
Mia lando apartenas al la t.n. tria mondo. Multaj homoj interesiĝas pri mia lando, ĉar antaŭ iom da tempo ni ekhavis novan registaron, kiu havas tute aliajn planojn ol la antaŭa. Ĝi ja volas ke la enloĝantoj kundecidu pri la aferoj farendaj. Por certumigi la homojn, oni uzas inter aliaj bildrakontojn. Tian bildrakonton ni nun montros al VI .
La manko de loĝejoj estas facile forigebla. Oni simple zorgu pri tio, ke suficê da domoj estu konstruataj!
Oh, ĉu vere ?
Ĉu fakte vi scias kiom da loĝejoj ni bezonas por loĝigi ĉiun ?
Mi ne scius respondi
Mankas 500.000 domoj !!
500.000 ?
VAŬ!


Ĉu mankas tiom da loĝejoj?Kiel tio povas esti?
Vi ja povas diveni kiu kulpas pri tio
Kulpas la kapitalisma sistemo Ĉiuj antaŭaj registaroj kulpas pri tio. .
Ili pli defendis la interesojn de la riĉuloj ol de la ordinaraj homoj!
La nuna registaro diras, ke ĝi defendas la popolajn interesojn.Kion ĝi faras?...
Eksidu ! Mi ĉion klarigos al vi!
Atentu, mi volas klaran respondon. Kaj ne tiu Bla-Bla !
Jen, kion ili nomas demokratio kaj libero!
..Ĝis antaŭ nelonge ni havis dekstran registaron.
Ni ja ne tuj povas liberigi nin el la ekonomiaj katenoj
Coca Cola
ITT


# POR SENNACIECA EKONOMIO

MODERNA FORMO DE ALMOZPETADO

Kunvenas komitatanoj de grava organizo, kies celo estas ĉiurimeda helpo al bezonantoj. Tiun-ĉi tagon, en la debatoj pri la ago en la departementa kadro, partoprenas iu el la naciaj respondeculoj de la sama organizo. Venas la temo : per kiuj rimedoj enspezi tiun monon, ĉiam pli grandkvante necesan por respondi al la helpdemandoj (medikamentoj por senlaboruloj, donacoj de la magaĵpakoj, de hejtigaĵoj, rektaj monhelpoj, pago de la restado en ferikolonioj por infanoj, ktp.). Krom periodaj alvokoj en la lokaj gazetoj, ĉefe kiam subita bezono stariĝas (mineja katastrofo) aŭ por kontribui al nacia kampanjo (por vjetnamaj infanoj, ekz.) oni uzas perleteran kontakton sisteme prilaboritan : ekzemple tiel oni tuŝas ĉiujn telefonabonantojn. La nacia respondeculo citas departementon maldense loĝatan, en kiu la tiea komitato kontaktis 50.000 personojn. "Vi povas fari la samon ĉi-tie". Ĉar la departementa respondeculino facilanime entuziasmas, kaj deziras elmontri al la naciajinstancoj de la help-organizo fekundan funkciadon de sia komitato, principe estas decidite trafi ĉiujn telefonabonantojn. Pro la granda nombro da kovertoj samtempe sendotaj, la Centro zorgos pri la enŝovo de la materialo (alvoko al donacoj, loteribiletaro) en ĉiun koverton, kaj pri la ekspedado; plie la Centro atingos favoran afrankon ĉar ĝi samtempe ekspedos kovertojn por aliaj komitatoj : do, avantaĝoj ĉiuflanke. Sed ...
Sed estas malfacile trovi kuraĝulojn por 500, 1000 kovertoj. Tamen tiuj, kiuj iam skribis adresojn, denove petitaj, tiams rifuzi; 50 FF-salajro por 1000 adresoj, donita al kelkaj ne sentedigas la laboron. Finfine pro deziro danki post helpo, pro amikeco al laprizorgantino, pro familia solidareco, por gajni iom damono,pro tutsimple sindonemo, la adresstoko iĝas kontentiga.
Sed kiom da kovertoj estos rifuzitaj al laleterportisto, kaj revenos al la sidejo; kiom da alvokoj restos sen respondo, aŭ la respondo estos rifuzo ! La Centro opinias, ke 2 % de la sendaĵoj estas sukcesaj, t.e. ke nur du leteroj el cent okazigos monsendon. Oni parolas multe en Francio pri la "silentema majoritato"; pri nia afero estas nur "paganta minoritato" kiu vivigas la organizon. Do estas tiu-ĉi minoritato kiu kovras la kostojn, sufiĉe grandajn, kaj permesas helpon. (kaj tiu helpo estas efika, mi povas mem konstati tion). Sed ne nur la rabado en la naturo por tiom da fuŝitaj paperaĵoj estas perdo, la tempo por skribi senutilajn adresojn povus esti pli agrable pasigita; la poŝtistoj ankaŭ ne plendus pro malpli da leteraĵoj.
Kaj tiu maniero de almozpetado ne estas la sola : sur la publika vojo gejunuloj monkolektas, ofertante isignon profite al militvunditoj, al kripluloj, al blinduloj, je iuj tagoj difinitaj per datreveno aŭ fiksitaj de la registaro; grandkvanta kaj facile trovebla estas tiucele la geknaba dungitaro : la instruistoj disdonas la markojn, eĉ al tiu knabo, kiu rifuzas ("Miaj gepatroj ne volas, ke mi vendu tion."); tiuokaze bonvolema kamarado zorgos duoble; alia flustras al la najbaro : "Estas la iama dekona imposto". Kaj la afero disvolviĝos jene : necesas eliri el la lernejo plej rapide kiel eble por trafi la"klientojn" antaŭ la de aliaj klasoj "vendistoj" (ĉu estas nur vendantoj pro laplurfoja ripeto ?); sed multajne havas siajn kutimajn aĉetantojn ... do la gepatroj kiuj plue ne ŝatas tiun pord-al -pordo-frapadon, donas la monon por kontentigi sian idon, tiu-ĉi timante grumbladon de la instruisto kaj ĝemetante ĝis sukceso se la familio rifuzas. Finfine sur la ĉeno ĉiu estas malkontenta : la komercistoj kiuj aŭdas tiom da sonorilavertoj, la gepatroj kiuj pagas kromimposton; la instruistoj kompreneble; kaj escepte de kelkaj geknaboj fundekomerculoj, la infanoj preferas alian kuradon. Apud utiligo de tiu senkosta junularo estas utiligo de potenco : mi pensas pri la alvokaoj al la radio- kaj televidaŭdantaro. Eĉ la kontraŭ-

antoj al reklamado sin sentas kortuŝitaj, kaj sendas monon por la kancer-batalo, por la malfeliĉaj infanoj en la mondo, ktp.
Ĉu tiu almozpetado, kian formon ĝi montras, estas normala ? Ĉu estus eble eviti tiujn malagrablaĵojn, ĝenojn kaj malŝparadojn de materialo, tempo... kaj la de mi nepriparolitajn ŝtelojn: ĉu la kolektita mono estos utiligata por ties celo anoncita ? certe tiu donita al la homoj kiuj sin prezenta s sub la aùspicioj de iu bonfara asocio kaj kolektas por si mem, ne iras al bezonantoj.
Konsideranta la homan naturon, oni agnoskas la eblecon de tio; kiam pli juna, mi estis instruisto, mi konsentis nur pri la fakaj markoj: ferioj por la junularo, kampanjo por la publika lernejo(kies profitduono estis por la loka lerneja kooperativo). Nun mi afable akceptas miajn junajn najbarojn, kiuj proponas al mi la samajn markojn; krome mi donas nur al du bonfaraj societoj, kiesefikon mi certas, kaj sisteme rifuzas ĉian alian postulon.
Tamen multaj homoj bezonas helpon : for de mi la penso ke malsatanto el Sahelo, ke orfa knabo el Vjetnamio, ke viktimo de terorreĝimo, de tertremo de inundego, ne estas helpindaj materiale kaj morale. Doni estas mani - festi sian solidarecon, kaj ĉu Esperantisto povas esti nesolidarema ?Sed ĉu ne estas aliflanke plenumi rolon de la ŝtato, kies registaro kuraĝigas La almozpetadon fare de bonfaremaj grupoj, eble kun la kaŝita rezonado "Tiel mi, registaro, povas pli enspezi por la militpreparado.
Rifuzi al la petantoj postlasas riproĉon en la konsciencon. Doni ankaù estas riproĉinda. Restas tria agado : labori al starigo de vere socialisme organizita socio. Inter aliaj tion faris, kaj daùre faras, la anoj de la Bellamy-movado kaj tiuj de la Movado Franca por Abundeco (M.F.A.), sur la ekonomia tereno.La ekzistantaj kaj produktitaj riĉaĵoj estu disdonitaj egale al ĉiuj; dank'al la modernaj produktrimedoj, post forigo de la neutila kaj malutilaj produktoj, ĉiu povus vivi home-dece, la riĉaj landoj helpe al la ĝis nun ekspluatataj landoj.
Kiam organiziĝos nacia tia disdonado, nepre evoluinta al interŝata disdonado kaj al monda disdonado, ne plu estas politikaj kvereloj kaj militoj pro ekonomiaj celoj, kaj plue ĉiu en la mondo ricevos sian parton de la ĉiesproprajô.
Kaj la disdonaj organizformoj anstataùos la almozpetantajn organizojn ...
Atendante tion : REZERVU VIN POR LA CIRKAUAJ MIZEREGOJ; NE FIDU LA INDUSTRIAN BONFARECON.

A. NAUDE
Sekretario de la Abundana Frakcio.




ABONANTOJ DE LA JUNA PENSO !

Vi ĝuas la legadon de nia mirinda zageto !
Kial ne ŝtopi la truojn de via biblioteko ?
Ĉu vi konas la Broŝurservon de LJP ?
Ne ? Do, tuj skribu al LJP-Broŝurservo, F-47340 Laroque, Francio por peti liston de la multnombraj eldonaĵoj.
Jes ? Tamen kontrolu, ĉu vi posedas la lastajn broŝurojn !

NE MALTRAFU LA PAĜON DE INTERNACIA GRUPO EPIKURA : TUJ LEGU PAĜON 24.

# por la paco

## Militrifuzantoj en malliberejoj

Ĉie en la mondo rifuzantoj de **la soldatservo estas** enkarcerigitaj. K-do Kunze proponas, ke ni sendu al ili poŝtkartajn salutojn por esprimi nian moralan subtenon.
Jen dek adresoj, kiujn komunikis la Internacio de Militrezistantoj (WRI) :

Claude Ruel, Maison d'arrêt de la Pierre-Levée, F 86000 Poitiers (Francio)
Michel Brier, Yvon Corlay, Michel Mace; Maison d'arrêt; 56, bd Jacques-Cartier, F 35000 Rennes (Francio)
Karl Eugen Kurrer, 1 Berlin 12, Sybelstrasse 6 (Germ. Fed. Respubliko)
Alexander Hermann, Jugendstrafvollzugsanstalt, Staumühle b. Paderborn, 4791 Hövelhof, Engernweg 44 (Germ. Fed. R.)
Stergios Misios, Rural prison of Kassandra, Annex Xenophon, Halkidiki, N. (Grekio)
Luis Gallego Lopez, ĉe Manuel Perez, Torres de Hercules 4, Grupo 4-3º-D, Cadiz (Hispanio)
Liborio Filippi kaj Francesco Galli, Carcere militare, caserma 30-maggio, 37019 Peschiera del Garda (VR/Italio)
Re'uven Ben-Zachri, David Masli'ach Namer, Ephrayim Mimzer kaj aliaj, Military Jail n-ro 4, Izraelio
Nicholas J. Riddell, Federal Prison, Sandstone, M.N. 55072 (Usono)
James Sager, Federal Prison, Tallahassee, F.L. 32302 (Usono)

Skribu al ili en esperanto ! Sur la karto estu glumarko aŭ kongresmarko kun mencio de esperanto kaj SAT. Tiel ili vidas, ke la PF de SAT subtenas ilin kaj samtempe aŭdas pri esperanto. En venontaj numeroj de "Sennaciulo" kaj de "La Juna Penso" aperos pliaj adresoj.

---

## Internacia Kolektiva Ŝtatservorifuzo

Okazis la 29an kaj 30an de novembro 1975 en Freiburg (Breisgau) kunveno de la internacia grupo I.C.I. (franclingve : Insoumission Collective Internationale).

### Kio estas I.C.I. ?

La Internacia Kolektiva Ŝtatservorifuzo estas agadkampanjo por pozitivaj, konstruivaj, radikalaj, neperfortaj ŝanĝadoj en la socio. La kernon de tiu kampanjo formis 12 viroj el kvin eŭropaj landoj, kiuj trudas la soldatservon. Ili publike anoncis en oktobro 1974 sian tutan rifuzon. Nuntempe ilia nombro atingas kvindek.

I.C.I. ne varbas novajn membrojn, sed male postulas de tiuj, kiuj volas kuniĝi, zorgan analizon kaj ekzamenon de la principoj.

La membroj de I.C.I. profunde konscias pri sia persona respondo, tiel en la vasta komunumo trans la landlimoj, kiel antaŭ siaj samlandanoj. Ilia kampanjo estas parto en sekvo de agadoj, kiujn ili intencas fari dumvive por konstrui novan socion bazitan sur la kontrolo de la propra vivo en la sferoj de la laboro kaj de la edukado, kaj en la sociaj kaj politikaj sferoj.

Pro la postulo trudata de multaj nacioj, ke iliaj viraj civitanoj submetiĝu al permilita trejnado, la rifuzo de la soldatservo aperas logika elirpunkto por unuigitaj agadoj cele al suma programo de konstruivaj ŝanĝoj de la socio. La konstruado de socio bazita sur la respekto de la homo individue kaj kolektive ne akordeblas kun la ekzisto de armeaj institucioj, kiuj detruas la kapablon de persona iniciato, de kritikemo kaj de respekto al la aliaj. Krome la soldatservo mem entenas en si ecojn funde malajn al tiuj de socialista socio, kiel ordonemo kaj hierarkio anstataŭ kolektiva solidareco. Tial tiu Ŝtatservorifuzo estas komponanto de la revolucia kontraŭmilitisma lukto, kaj signifas tutan rifuzon labori kun la armeaj institucioj, kiuj estas la "pilieroj", sur kiuj apogas sin la kapitalistaj sistemoj.

La membroj de I.C.I. ankaŭ rifuzas civilan servon, kiel tiun, kiun kelkaj ŝtatoj akceptas por la rifuzantoj de la soldatservo, ĉar iliaj analizoj kondukas ilin al la nepra konkludo, ke akcepti anstataŭon de la soldatservo per alia servo supozigas, ke oni

kondiĉas la ekziston de la militistaro. Por ili, la servo al aliaj homoj ne estas afero de kelkaj monatoj en la junaĝo, sed privilegio kaj responso por la tuta vivo. La baza konflikto estas, ĉu ĉia formo de armea strukturo estas prava.

Pro ilia ŝtatservorifuzo tiuj viroj akceptas kondamnojn al la malliberejo. Ĉe la aresto kaj enkarcerigo de ĉiu membro de I.C.I. oni anoncas la aliĝon de novaj membroj al la kampanjo en diversaj landoj.

## Kio estas la nuna stato de la kampanjo ?

Ĉar la leĝoj pri la soldatservo ege malsimilas de unu lando al la alia, la kampanjo agadas laŭ du niveloj - nacia kaj internacia.

### Federacia Germanio

En 1976 estos balotata nova leĝo pri la soldatservorifuzo, kiu donos pli da liberoj, sed difektos la esencan signifon de tiu rifuzo. Peter Rath, jam juĝita pro rifuzo de la anstataŭa servo, devas esti rejuĝata kaj Egon Spiegel, enregimentigenda en januaro, sciigis sian rifuzon. Projektata estas nacia kunveno. Interesatoj skribu (germanlingve) al : Dieter Schoffmann, 5 Köln 41, Palanterstr. 9 C.

### Italio

Pro reformo de la militistaj malliberejoj akirita per mangstriko, la korespond- kaj viziteblaj estas nun pli vastaj. Profitu de tio ! I.C.I. klarigos siajn poziciojn okaze de la kongreso de la objetantoj al la soldatservo kaj serĉas kontaktojn kun la "Partito Radicale".

### Svisio

Nur malmulte da diskutoj kaj kontaktoj eblis, ĉar la svisoj ŝajnas armeemaj (svisaj legantoj de LJP estas alvokataj pruvi la malon !).

### Nederlando

La juĝado de Ger Pouw far militkonsilio ebligis eĥoigi lian rifuzon. Rifuzantoj de aliaj landoj probable estos atestantoj ĉe lia dua proceso. Arestotaj estas Dick Willemsen kaj Piet Groneveld.

### Britio

I.C.I. partoprenos en la konferenco de York pri senarmado.

### Usono

La proksima armea censado okazos la 31an de marto. Rifuzagadoj estas projektataj.

### Francio

La baldaŭaj procesoj de Roland Schaer kaj Jean-louis Soulié en Metz estos okazo por klarigi la tutaĵon de la puna rolo de la armeaj tribunaloj. Tiuj du procesoj certe havos grandan eĥon en Francio.

### Alsaco-Badio

Okaze de la subteno al Raymond Schirmer la kampanjo preciziĝis kaj koniĝis notinde per la bruligo de francaj kaj germanaj soldatlibretoj en Mulhaŭzo, Kolmaro kaj Strasburgo.

### Internacia marŝado

Pro iniciato de la itala "Partito Radicale" de Marco Panella marŝado estas projektata por aŭgusto en Alzaco-Loreno. Ĝiaj celoj estas :

- malmilitigado de la socio
- opono al NATO
- civitanaj rajtoj por soldatoj kaj objetantoj
- liberigado de ĉiuj malliberuloj, viktimoj de la armeaj tribunaloj
- aplikado de la celoj kaj metodoj de la neperforto

Kontaktadreso :
I.CI. ĉo I.F.O.R.
Van Elewijkstraat 35
1050 Bruselo, Belgio

trad. J. Lépeix

---

## Nova broŝuro !

La nova broŝuro de ni eldonita kun titolo "Ĉu armeo aŭ civila neperforta defendo" (vidu recenzon en LJP, n-ro 109) estas havebla je 5 fr.fr. aŭ egalvaloro ĉe la sekretario, kies nova adreso estas :
R. Schneller
57, rue des Maraîchers
CH 1205 Ĝenevo, Svisio
Poŝta ĉekkonto 12-20143, Ĝenevo.

---

LEGANTOJ ! LEKANTOJ ! VI, KIUJ, CIUN DUAN MONATON, LEKE LEGAS NIAN MIRINDAN ZAGETON ! NE FORGESU TION : LA KONGRESO - TUTMONDA - DE SAT - SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA - ĈI-JARE OKAZOS EN GOTEBORG, T.E., POR LA MALBONE INFORMITAJ HOMOJ, EN SVEDIO (IOM NORDE DE EUROPO, POR LA TRE MALBONE INFORMITAJ HOMOJ).

Tiu aranĝo estas ja tre grava por la laborista esperanto-movado, kaj nepre VI, leganto de LJP, SAT-ano, interesito, nepre vi partoprenu tiun kongreson, kiu daŭros de 24a ĝis 31a de julio !

Ĉiuj informoj haveblaj ĉe SAT, 67 avenuo Gambetta, F-75020 PARIS. Plie, ne nur tiu kongreso estos mirinda, sed LJP-budon vi povos frekventi tie dum plena semajno. Tie vi povos aboni nian zageton, se tion (hontu !) vi ne jam faris antaŭe. Tie vi povos epikure amuziĝi kun la famkonata teamo de LJP. Ankaŭ vi povos labori, memkompreneble, en la laborkunsidoj, voĉdoni por plej diversaj rezolucioj, proponoj, vi povos partopreni debatojn, kontraŭstari aŭ apogi vidpunktojn, prezenti viajn ideojn, ĝui prelegojn, ekskursi en tiu mirinda lando kie la Internacia Grupo Epikura povos tute libere diboĉi, kaj diboĉigi. Ha ! Vere, se vi ne povus veni en Göteborg, vi maltrafus la plej gravan eventon de la jaro en esperantio !

# internacia grupo epikura

En la nuna financa internacia ĥaoso, estas malfacile taŭge uzi sian monon. Tamen, la kasisto de I.G.E. konsilas al vi la provizigon de fortaj devizoj, interaliaj : "Ni fosu nian sulkon", "Post vintro venas printempo", ktp.

*

Anonceto : Oni serĉas sinjoron ne sciante legi, sed bele skribante, por kopii sekretajn tekstojn. Skribi al Loockheed Inc.

*

Por vendi :
- Falsaj raziloj por personoj surhavantaj falsajn barbojn : 13.25 FF.
- Truitaj kaseroloj, kiuj povas utili kiel kribrileton. Po unu : 1.95 FF.
- Aĉetas aŭ interŝanĝas aŭ vendas ion ajn, je iu ajn prezo kaj al iu ajn, rendevuo ie ajn kaj je iu ajn horo,ĉiel ajn estos neniu.
- Manlibro : "La arto vendi", 12 FF. Manlibro : "La arto vendi manlibrojn", 29.90 FF.

*

El "Nov-Zelanda E-isto" (n-ro 6-75) :

"Esperanto en Ĉinio

(...) ĉeestis dudek personoj, inkluzive de tre ŝatinda maljunulo, kiu eklernis nian komunan lingvon en la jaro 1835."

Denove estas pruvite, ke dank'al la studo de la penso de nia ruĝa gvidanto Maŭ Zedong, oni superas ĉion, kio eblas !

*

Laŭ seriozaj informoj, la "C.I.A." perdis 100 milardojn da dolaroj en Angolo. Ni petas de la gekamaradoj, kiuj trovus tiun sumon, tuj averti la centran komitaton de la I.G.E.

*

Ni legis en la franca eldono de "l'Anti-Kautsky" (verkita de konata marksistradikala Karl Korch), ke Marks kaj Engels vetis pri la aperdato de la famkonata broŝuro "Le 18 brumaire de Louis Bonaparte". La veto estis : kesto da 12 vinboteloj. (aŭtenta !)

*

Volapüka Ordeno : SENNACIULO - februaro '76 - gajnis nian premion ! Ĉe p.20, oni legas jenan anonceton : "Kun knabo aŭ knabino 24-jara ĉeĥino, kiu estas libera (deziras korespondi) ...". Ni kun ĝojo, konstatas, ke eĉ S-ulo nun sekvas la de ni inaŭguritan vojon, kaj nun akceptas dubesencajn anoncetojn ! Efektive, por kion fari ŝi estas libera ? Tuj skribu al ŝi ! ...
Denove gratulojn al nia kolega gazeto !

*

Krizo en I.G.E. ! El la redaktejo de nia grupo, ni kaptis jenan dialogon :
"- Sodomiston !
- Bugritulo !
- Midzulo !
- Pederasto !
- Lesbanino !
- Kozako !
- Mozaiko !
- Ŝtumfo !
- Revizionista epikuristo !"
Sekvis du pafoj.
Ni kondolencas la katon de K-do Ĵak Le Puil.




Le directeur de la Publication : Baudé. Imprimeur : Le Galès, 67 rue de Franceville, F-93220 Gagny. Commission Paritaire de Presse nº 39863.